

Joachim Ringelnatz,
Genuo-pendo

tradukita de Manfredo Ratislavo

Mi pendas de turn-stango
kaj kapen fluas la sango.
Se estus mi vesperto,
mi kaptus insektojn kun lerto,
samkiel musetofluganta;
dumtage mi estus pendanta
en iu angulo malhela,
dormante en sonĝo miela.
Ho, mia verto – ve-sperto!
Sentiĝas al mi la inerto!
- Perversa vespera vesperto -
Ne eblas plu!
Tra iu truĉo
malsupre en mia kranio
elfluas jam mia racio.

*Traduko de la Germana poemo "Kniehang" de JOACHIM RINGELNATZ (Hans Bötticher, *1883 – †1934)
en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio,
1938-11-04) en 1983-02.

MR-034-2 / Arg-584-1177 (2012-05-14 18:39:13)